

TERMINOTEKO

Informilo pri terminara laboro de Germana Esperanto-Instituto
Terminologische Informationen des Deutschen Esperanto-Instituts
en kunlaboro kun / *in Zusammenarbeit mit*

Perkomputora Termino-Kolekto
(Pekoteko)

14

Cirkulero n-ro 14 (6 jaro, 2/1996). ISSN 1430-4473

«96-09-01»

Estimata sinjorino, estimata sinjoro,
karaj geamikoj,

celo de nia informilo unuagrade estas
peri informojn inter aktivuloj kaj inter-
esatoj de diversaj nuntempaj termi-
naraj aktivecoj en Esperanto. Tiel ni
volas pli rekte ligi leksarajn laborojn
de diversaj fakoj, por ke ĉiuj povu
profiti de la spertoj jam faritaj de aliaj.
Tiel ni volas malhelpi, ke ĉiu denove
devas "reinventi la radon".

Ni tamen ne nur volas peri kvazaŭ
"horizontalan" interŝanĝon nun-
tempan, same necesas ligo al la riĉaj
spertoj de niaj antaŭuloj, do kvazaŭ
"vertikalan" ligo al pasintaj laboroj
vortaraj.

En tiu ĉi numero vi trovos kontribuojn
pri ambaŭ direktoj: Pri la kunigo de

nuntempaj aktivuloj legu nian gvidan
artikolon pri projekto de "inform-borso
de Esperanta terminiko (IBET)" kaj
sciigu vian opinion kaj vian eblan
kontribuon al ni.

"Vertikale" informu vin en nia rubriko
"la historia terminaro" pri interesa
terminaro de Paul Neergard jam el
1936, tamen daŭre valora.

En tiu rubriko ni laŭeble volas prezenti
al vi elĉerpitajn, maloftajn, eble
preskaŭ forgesitajn terminarojn ne plu
haveblajn, kies saĝecon tamen indus
enigi en la grandan kolekton de
hodiaŭa elektronika Pekoteko. Ni
komencas nian serion per "Neergard"
pro diversaj kialoj: Malgraŭ de
modesta aspekto ĝi ŝajnas al ni
avangarda kaj ankoraŭ hodiaŭ
imitinda ekzemplo de faka terminara
laboro. Ĝia daŭra aktualeco i.a.
montriĝas per tio, ke la forstscienca
vortaro *Lexikon silvestre* (vd. nian

noton en ckl. 6) en 1993 i.a. proponas "enkonduki" kelkajn "neologismojn" jam troveblajn ĉe "Neergard". Ĉu oni do "reinventis" ilin aŭ ĉu oni ĉerpis el tiu malnova fonto? Ĉiuj indikoj montras al la unua alternativo. Estas do tre dezirinde reveki la dormantajn terminarajn trezorojn, ĉar ankaŭ tiukampe ĝustas la frazo: "Kio ne estas en facile akirebla kaj kosultebla verko, ne estas en mondo". Jen do giganta tasko por niaj termin-farantoj-komputorantoj: Rehavigu al ni la laborfruktojn de niaj pioniroj. Ankaŭ tiukampe via kunlaboro estas bona.

enhavo

Reagoj.....	34
GEI kaj terminologio: <i>Haase</i>	3
Termino-elekto: la fervojistaj spertoj:	4
Revizio de PIV: juro.....	5
Novaj terminaroj.....	46
Terminaraj Projektoj.....	49
Esperantologio	53
Terminologia kurso	57
Iom pri la komputoro	58
Listo de elektronikaj E-aĵoj.....	60
Korektoj	31
Lingvaj diskutoj	61
Aktuala terminaro.....	63
Terminoteko	31
Niaj vortaristoj: <i>Minnaja</i>	64
La historia citaĵo: <i>Lanti</i>	32

reagoj ...

»Tre bone estas via principo, ke oni „pagas“ Terminotekon per informoj, kontribuoj al terminara laboro aŭ per -donacoj. Kaj ke oni povas sendi donacojn al la kasiston de GEA. Tiel subtenemuloj ne timos, ke vi metos donacitan monon en vian propran poŝon, kvankam ja devus esti evidenta por ĉiu, ke vi pagis multe pli por eldoni kaj dissendi Terminotekon, ol vi ricevis per donacoj.«
Rüdiger **Eichholz**, Kanado.

Sinjoro **Thierry**, sekretario de la Akademio, konsente reagis al nia diskuto en Terminoteko n-ro 8 pri la „milito de la majuskloj“: ».. Sed jam de kelka tempo mi nun majuskligas ĉiujn derivaĵojn de propraj nomoj ĝuste por evitigi ian konfuzeblecon.«

Terminologio: la fervojistaj spertoj

*En Terminoteko 13 sinjoro Ullrich prezentis terminologiajn spertojn de la forstistoj. En tiu ĉi numero sinjoro Heinz **Hoffmann**, Finstere Gasse 2, D-01445 Radebeul, Germanujo, sekretario de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) daŭrigas per raporto pri la terminologia laboro de la **fervojistoj**. En modela maniero ĝi radias al la „ekstermovada mondo“. Volonte ni raportos pri la aktivecoj de pliaj fak-organizaĵoj. Dankon pro viaj*

kontribuoj. Sed nun ek al la pensiga artikolo de sinjoro Hoffmann:

Terminologia Laboro en Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)

Labormetodo

Internacia Fervojunio *UIC* eldonis diskedoforman terminaron *RailLexic*, kiu ĝis nun enhavas ĉ. 11.100 nociojn prezentatajn per terminoj en 11 lingvoj (angla, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, pola, portugala, sveda kaj Esperanto). Oni volas estonte enigi kromajn lingvojn kaj periode pligrandigi la nocio-nombron. En la koncerna projekt-grupo IFEFF estas egalrajta kiel ĉiu membro-fervojentrepreno. El tio sekvas devo, ĝis limdatoj traduki ĉiujn novajn terminojn, kiujn *UIC* donas en angla, franca kaj germana lingvoj. La fervojfako havas multajn sub-fakojn. Neniu fervojisto estas eksperto en ĉiu subfako. Pro tio landaj grupoj de Terminara IFEF-sekcio responsas pri subfakoj laŭ sia konsisto el fakuloj. Ekzemple en la dana grupo dominas fakuloj pri ekspluatado, en la rumana grupo pri maŝintekniko. La landaj grupoj faras unuajn tradukproponojn en siaj subfakoj. Per kompilo de ĉiufakaj proponoj estiĝas „bazfolio“, kiu estas sendata al ĉiuj landaj grupoj. Sekve ĉiu kunlaboranto laŭ sia faka scio povas revizii terminojn kaj kontraŭproponi per „respondfolio“. Per kompilo de ĉiuj respondfolioj estiĝas „resumfolio“ por ĉiuj landaj grupoj. La

dua revizio okazas per elekto de plej bona solvo por ĉiu nocio. Tiel estiĝas „elektfolio“. La rezulton el ĉiuj elektfolioj montras „protokolfolio“. Restantaj gravaj diverĝoj de opinioj estas traktataj en kunsido de Terminara Sekcio. Nur post tiu tria revizio, la Esperanto-terminoj estas pretaj por *RailLexic*.

Specialaj problemoj

El ĝisnuna laboro ni spertis jenajn malfacilaĵojn:

Kontraste al natursciencoj, multaj aliaj fakoj evoluis sur nacia bazo sen internacia akordigo. Estiĝis diversaj nocio-termino-sistemoj en unuopaj landoj. Sekve plurlingva vortaro ne ebligas ĉiukaze ekzaktan komparon, ĉar ofte malantaŭ ekvivalentaj plurlingvaj terminoj kaŝiĝas nur similaj, sed ne egalaj nocioj. Kiu interesiĝas pli detale pri la problemoj, bv. legi la artikolon »Interesaj komplikajoj en difinlaboro«, en Fervoj-fakaj Kajeroj n.ro 2, mendebla ĉe Henning Hauge, Banegårdspladsen 14, DK-9700 Brønderslev, Danujo.

Por eviti ripetojn de perifratoj, aŭtoroj ofte mem kreas en sia teksto pro tre specialaj nocioj pseŭdoterminojn, kiujn eĉ fakuloj komprenas nur post legado de la kunteksto. La terminaro *RailLexic* enhavas multe da tia balasto kun abundaj mistradukoj. Jen ekzemplo:

En teksto pri urbtrafika koncepto, por esprimi dunivelan kruciĝon de strato kaj fervoja stacio, kie la fervojo situas en supera nivelo, aŭtoro kreis la germanan pseŭdoterminon *Bahnhofs-hochlage* (alta stacio-situo). Tiun pseŭdoterminon oni listigis en

RailLexic (sen kunteksto) kaj postulis tradukon. Tiukaze ni ne „perforte“ kreu alilingvan terminon, sed preferu koncizan perifrazon.

Ne ĉiam oni klare distingas inter termino kaj nomo. Precipe por varefektoj pli kaj pli aperas pseŭdo-terminoj pri trafik-ofertoj. Ili vere estas nomoj ne tradukendaj.

Jen ekzemplo: La mallongigo *ICE* estiĝis el *Intercity Express*. Ĝi estas tipnomo de germana motorvagon-unuo por grandrapido. Traduko al „interurba eksprestrajno“ estas misa, ĉar ĉiu eksprestrajnoj (ne nur *ICE*) veturas inter urboj. Sekve ni lasu la originalan mallongigo-nomon kaj skribu por *RailLexic* jenan perifrazon: »eksprestrajno konsistanta el motorvagonaro de tipo *ICE*«.

Kvankam en ĉiu faka lingvo sinominoj estas nedezirataj, multege da tio ekzistas en naciaj faklingvoj. En *RailLexic* multaj sinonimoj estas mistraktataj kiel memstaraj nocioj. Oni ne sufiĉe kontrolis, ĉu nova termino reprezentas vere novan nocion, aŭ estas nur sinonimo al jam enenstanta termino. Tiel estiĝas nenecesa postula al denova traduko.

Jen germanlingva ekzemplo kun kontinua *RailLexic*-numero: 2919 Motordraisine = 10207 Gleiskraftwagen = motordrezino.

Nova tasko: Nociosistemigo

En Terminoteko 13, Ingwart **Ullrich** starigis kvin ĉefajn terminologiajn principojn koncerne vortigon de terminoj. Pro tio mi volas detale trakti en tiu ĉi kontribuo la 1an kaj 2an principojn. Temas pri sistema aranĝo kaj difino de nocioj.

Por modest kontribui al plibonigo de la terminaro *RailLexic*, nia Terminara Sekcio komencis ellabori nocio-elektajn kontribuojn. Ili konsistas el pluraj nociokompleksoj. Unu nocio-komplekso enhavas superrigardeblan nombron de najbaraj nocioj, kies difinoj dependas unu de alia. La nocio estas ordigataj per kadroj tiel, por ke sueraj kaj samrangaj nocioj estu facile videblaj. Por la unuopaj nocioj en kompilita nocio-sistemo estas vortigataj labor-difinoj. Tiuj konscie ne estas tradukoj el leksikonoj kaj reglamentoj en naciaj faklingvoj. Ili enhavo precipe ebligu klaran diferencigon al najbaraj nocioj.

Kiel ekzemplo servu la 4a nociokomplekso „Specoj de trakoj laŭ vidpunkto manovra veturo / trajnveturo“. Jen antaŭklarigo por nefervojistoj: Ĉe fervojo oni grave distingas veturojn inter trajnveturoj kaj manovraj veturoj. Trajnveturo okazas de stacio al stacio laŭ speciala signalsekuriga sistemo. Manovra veturo okazas interne de stacio, malpli rapide kaj sekurigata pli simple ol trajnveturoj. Sekve strukturo kaj ekipaĵo de trako grave dependas de uzo aŭ neuzo por trajnveturoj kaj de situo en aŭ ekster stacio. El nociosistemigo rezultas jenaj 6 necesaj nocioj:

[tie ĉi en la originalo estas kopiita peco ne reproduktebla en tiu ĉi elektronika represoj]

4.1. estas supernocio super 4.2. kaj 4.3. 4.5. estas supernocio super 4.3., 4.4. kaj 4.6. Komparo kun *RailLexic* montras, ke tie mankas nocio 4.4.

(neniu kontinua numero) kaj pluraj nacilingvaj terminoj estas misordigitaj al neekvivalentaj.

Heinz Hoffmann, Radebeul

Revizio de PIV

En **Terminoteksto** 12, p. 37-41 Akademiano *Eichholz* raportis pri siaj spertoj dum la reviziado de PIV. Sinjoro Ingwart *Ullrich*, Am Feldrain 11, D-98646 Hildburghausen, Germanujo reagis per jenaj (de ni iom mallongigitaj) rimarkigoj:

Pri 2.1 [Se en PIV estis registritaj arĥaigintaj vortoj, ili estu tiel klare markitaj]

... oni sen profunda pripenso ne forstreku el PIV malofte uzatajn vortojn kun preciza sama signifo kiel ofte uzata vorto. Ĝuste rilate al plursencaj vortoj, ekz. kiel „grajno“ (6 signifoj), almetita vorto (kiel „sem-“) povas precizigi la intencitan ideon. Tial mi ne opinias „sem-grajno“ arĥaiginta vorto. Estus pli necese, forstreki ekz. ĉe dusenca vorto unu signifon, se por tiu ĉi vorto ekzistas pli preciza, ne miskomprenebla vorto, ekz. rikolto (2) = rikoltaĵo.

Pri 3.12 kaj 3.13 [PIV rekomendu pli prezican aplikon de afiksoj kaj apliku pli trafajn prepoziciojn]

Mi tute konsentas pri la faritaj proponoj. ... Sed rilate al „-il“ estus necese nuligi sub RIM -il (2) la frazon: „Tamen tiu regulo ne estas absoluta ...“.

Pri 3.14 [PIV uzu en difinoj laŭeble la plej kutimajn terminojn]

Laŭ mi **ŝmiraĵo** ne estas plene adekvata termino por ŝmir-graso. [Sekvas - konvinkaj - argumentoj]. Pri **grasumo** validas la sama aŭ simila kiel rimarkite sub 2.1. Estas ankaŭ demando de la uzosfero, do, ĉu oni uzas iun terminon/nocion sur ĉiutaglingva („grasumo“) aŭ faklingva („sterko“) kampo.

Pri 3.15 [Se iu en PIV donita difino arĥaikiĝis, oni indiku tion]

Analoga ekzemplo [al la misa „grasaĵo = plej bona nutraĵo“] estas „senarbigi = detruo la arbojn de regiono“. Kial „senigi“ interpreti (nur) kiel „detruo“ kaj ne ĝenerale kiel „fari, ke io (regiono, arbara areo) estu senarba“? Sur forstfaka kampo „senarbigi“ estas termino por „depreni ĉiujn arbojn de sur arbara areo en ununura faligada procedo“ (totaldehakado).

Pri 4.6 [-ata/-ita problemoj]

Mi subtenas la opinion de *Eichholz* pri **-ata/-ita**, sed la montrita ekzemplo estas iom ne konvena. La terminon „grafaĵo“ oni povas konsideri kaj „greftotaĵo“ kaj „greftataĵo“ kaj „greftitaĵo“. Oni ja greftos, greftas aŭ greftis. ... La forstfaka signifo de „greftaĵo“ estas: »Parto de (genetike valora) ligneca planto, greftota, greftata aŭ greftita sur alian lignecan planton«.

Pri 8. [Tro da ekzemploj]

Estus domaĝe, se oni reduktus la penige kolektitajn ekzemplojn. Ili ja

ankaŭ pruvas pri la elasteco kaj vivanteco de Esperanto-lingvo. ...

La de *Eichholz* montritaj kritikindaĵoj certe estas nur pinto de glaci-monto, sed ili pruvas la urĝan neceson de fundamenta revizio de PIV.

Tradukoproblemoj kaj decidomekanismoj ĉe la revizio de kulinaraĵ terminoj de PIV

La sekvanta kontribuo estas Esperanta adapto de Germana prelego de sinjoro Claus J. Günkler dum la kunveno de Gesellschaft für Interlinguistik (GIL) en Berlino je 1995-11-25. Sinjoro Günkler estas la revizianto de la kulinaraĵ terminoj kaj krome de la trivialaj kaj vulgaraĵ vortoj en PIV. Bonvolu atenti lian alvokon al kunlaboro kaj ekaktivu. Sed nun ek al lia raporto kaj „bonan apetiton“!

Por revizii la kulinaraĵ terminojn de l' nova PIV estas du grandaj kondiĉoj: unue forigi la erarojn de PIV kaj de ĝia suplemento, due aldoni terminojn, kiuj jam estas vaste uzataj kaj kiujn ĉiu klera homo konu. Ĉi tiel jam antaŭ-programita estas tre zorgema kaj diskutriĉa procedo.

Por povi orientiĝi en tiu densejo de korektado, plibonigado, novaj difinoj kaj proponoj endis dekomence devigi sin noti la econ, fonton, kialon kaj argumentadon de ĉiu ŝanĝo. Estis konstruita sistemo el dek unu punktoj: de punkto 0 (= neniuj ŝanĝoj), punkto 1 (= eta ŝanĝo, forigo de malglataĵo aŭ skriboeraro) k.t.p. ĝis tute nova difino.

La baza teksto estas la skanita teksto de PIV kaj ĝia suplemento ricevitaj de *Klaŭdo Roux*.

Tiklaj estas la punktoj 7 kaj 8; ili signifas, ke novajn terminojn, radikojn aŭ ekzemplon oni proponas el alia verko (temas ĉefe pri vortaroj, glosaroj kaj kuirlibroj) aŭ de iu persono.

Pluraj tiaj proponoj estas certe sendiskute akceptindaj: *flipo*, *ĝinfizo*, *kiŝo*, *kiro*, *mocarelo*, *martinio*, *paelj*, *sangrio*, *tofeo*, *kapuĉino*, *rislingo*, *muslio* k.s. apartenas al la kategorio de ioj konataj de ĉiu klera homo kaj ne akceptas aliajn skriboalternativojn. Sed multaj proponoj estas diverskiale malfacilaj kaj estu prilumataj ĉi tie:

Breco estas propono por la germana *Bretzel* kaj la angla *pretzel*, kiu troviĝas en almenaŭ sep verkoj: en vortaroj de malsamaj lingvoj kaj en Esperanta kuirlibro. Estas ankaŭ proponita la vorto *brecejo* de unu sola esperantisto. Ĉu ekzistas la „rajto de la unua proponinto“? Kiu ajn kiam ajn kreis la radikojn *brec'*, li iel gajnis kontraŭ la kreinto de *brecejo* - se oni povas kaj rajtas paroli pri gajno ĉi-probleme. Ĉu? La afero ne ŝajnas tiel facila: necesas havi la maloftan kaj valoregan talenton povi antaŭvidi la lingvouzon. Ĉi tie ŝajnas temi pri la tendenco voli havi unusilabajn aŭ malpli longajn radikojn: *brec'* kiel *pic'* aŭ kiel *fo(ografija)'*, *nark(ot)'*, *porn(ografi)'*, *(vir)in'*, *feder(aci)'*, *inaŭgur(aci)'*, *koment(ari)'*, *diap(ozitiv)'* k.t.p. Tial verŝajne *brecejo*, *picejo*,

tekila' kaj *kokakola'* ne havas ŝancon kontraŭ *brec'*, *pic'*, *tekil'* kaj *kokakol'*.

Benjeto estas fritita pastobulo, kiu ion entenas. Tiu termino ja estas sufiĉe vasta kaj ĝenerala, sed ĝi ĉiam povas esti precizigita per la indiko de ĝia enhavo. Tiel ĝi servas por traduki la francan *beignet*, la germanan *Berliner* (*Pfannkuchen*, *Krapfen*) same kiel la anglan *donut* kaj ĉeĥan *buchta*. Ŝajnas sekve superflue enkonduki vortojn kiel *berlinero*, *donuto* kaj *buĥto*. Ĉu?

Brio, *ĉesiro*, *ĉedaro* kaj *ĉestro* estas fromaĝotipoj. Ekestas la grava demando, kiuj tipoj valoras esti menciita en la nova PIV. Pluraj estas menciendaj certe, kaj PIV-e jam troviĝas kelkaj: *kamemberto*, *grujero*, *rokforto*. Ne eblas menci ĉiujn - sed kie estas la limo? Kio pri *munstero* kaj *etorko* el Alzaco kaj Eŭskio? Oni vidas, ke la redaktinto de PIV estis franco: dum *camembert*, *guyère* kaj *rockfort* ne mankas, eĉ la fama itala *parmezano* mankas. Biero same kiel fromaĝo estas tikla afero. Troveblaj estas *kvaso*, *medo*, *cervezo*, *elo*, *portero*, *salvatoro* kaj *staŭto*. Sed mankas tipaj bierspecoj kiel *Pilzena*, *Kolonja*, *Duseldorfa*, *Budevica* kaj *Berlina*. Kie estas la limo? Natura solvo povas esti simple aldoni urbajn aŭ regionajn nomojn: *Edama*, *Tilzita*, *Ĉestra* fromaĝoj, *Budevica*, *Kolonja*, *Irlanda* bieroj.

Kiel traduki la anglajn, internacie konatajn *ginger ale*, *Coca / Pepsi Cola* (*cola*, *coke*), *chips* kaj *hamburger*? ĉu pli bone *zingibra biero*,

zingibra limonado, *zingibra trinkaĵo*, *zingibra sodo* aŭ *gingerelo*, *gingero*? *Ĝingero* estas bona vorto laŭ la 15-a Regulo same kiel *kokakolo*, *pepsikolo* - sed ili ĉiuj estas specoj de limonado, se oni plivastigas la sencon de limonad'. Kaj kiu el la proponoj *hamburgero*, *hamburgo*, *hamburgoro* kaj *burgero* gajnos? Necesas havisian manon sur la pulso de l' lingvouzo.

Kio pri aferoj, kiuj en certa kulturo-cirklo diferencas de la cetero de la mondo? Oni povas trovi *hoĉon* kaj *ĉokon*, specialajn tranĉilon kaj bovleton Niponajn, aŭ *poriĝon*, specialan avenkaĉon, aŭ *bujabeson*, specialan fiŝsupon. Kaj kio pri la diversaj akvetoj *slivovico*, *ŝidamo*, *ŝnapso*, *arako*, *kirŝo* k.t.p.? ĉu sufiĉas la indiko de la regiono aŭ de la urbo, kiel okaze de la bieroj kaj fromaĝoj? Ni ĉiam atentu, ke la 15-a Regulo estas tiel libera, ke kontraŭ kreo de internacia fremdvorto oni nenion povas fari: ĝi permesas la vortojn *viskio* kaj *vodko* same kiel *kirŝo*, *slivovico* kaj *ŝnapso*. Kaj fakte oni ofte renkontas tiajn vortojn dum paroladoj. *Kroepoek* estas la nederlanda vorto el la indonezia por salikoka fritiĵo. Do *krupuko* laŭ la 15-a Regulo, ĉu?

Ĉu *keĉupo* aŭ *keĉapo*? Ĉar la granda plimulto el la etnaj lingvoj elparolas kun *a* kaj ne kun *u*, la dua alternativo ŝajnas la pli bona. Krome la origino estas la ĉina *koe tsiap*, kiun la indonezia kaj nederlanda akceptis kiel *ketjap*. Tamen multaj Esperantaj vortaroj preferas la unuan formon kun *u*. Kiu troviĝu en la nova PIV?

Sauce béarnaise, sauce hollandaise kaj *sauce bechamelle* certe estas internacie konataj - do ili estas fremd-vortoj. La tria termino jam troviĝas en PIV pere de la 15-a Regulo: *beŝamelo*. Analoge do *bearnezo* kaj *holandezo* same kun *-ezo* kiel la kulinara *majonezo* kaj la nekulinara *anglezo, polonezo* kaj *Marselezo*?

Fruits de mers, frutti di mare kaj *Meeresfrüchte* permesas la Esperantan esprimon *marfruktoj*. Kial ne?

Ekzistas speciala kukospeco en meza Eŭropo: *čefe drobenka*, dane *krymmel*, germane *Streusel*, nederlande *snippers*, pole *kruszonka* kaj ruse *štrejzel*. Por la 15-a Regulo ne ekzistas komuna radiko elkristaliĝinta. La sola solvo povas esti kunmetita vorto. Ĉar tio estas miksaĵo el faruno, butero kaj sukero, oni nomu ĝin *sukerbuteraĵo*. Dua alternativo laŭ la 15-a Regulo ne ekzistas - aŭ kiu pledus por *drobenko, ŝtrojslo* aŭ *krumlo*?

Esperanto dekomence estas demokratia lingvo male al Volapuko. Ke plimultodecidoj ene de certa kadro estas necesaj, legitimitaj kaj sankciitaj, respeguliĝas en la Bulonja Deklaracio kaj la decidokieloj de la Akademio de Esperanto. Ankaŭ ĉe tia revizio nur vasta nombro da kontrollegantoj kaj fina plimultodecido povas esti la solvo de krizaj demandoj - neniam forgesante la oreton ĉe la pulso de l' lingvouzo. Ofte estas la sola solvo allasi du alternativojn: unu vorton laŭ la 15-a Regulo kaj unu

vorton kunmetitan. Ekzemple *tofuo / sojkazeo, bujabeso / franca fiŝsupo, krupuko / salikokpano, (pom)fritoj / terpomfingroj, campo / buterteo, kuglofo / kronkuko, ĉipsoj / terpomflokaj, cidro / pomvino, grivoj / grasŝrumpajoj*.

Ĉar: alternativoj kaj plimultodecidoj nur provizore povas anticipi la finan plimultodecidon: tiun de la lingvo-parolantaro esperantistoj, tiun de la lingvouzo.

Ĉiuj, kiuj volas kunlabori kaj kundiskuti pri kulinaraĵoj, estas kore bonvenaj kontakti min. Mi same prizorgas la trivialajn kaj familiarajn vortojn kiel revizianto de PIV kaj ĝojus pri via kunlaboro.

Claus J. Günkel (Esperante: Nikolao J. Gunkel), Postfach 10 04 47, D-41704 Viersen, Germanujo, tel.: ..-49-2162-33788.

La kaŝitaj trezoroj de PIV

En PIV estas ŝpurebla aro de radikoj uzata en difinoj, sed ne registrita kiel enskribo-titoloj de vortara artikolo kaj pro tio ne facile trovebla en la ĝusta alfabeto ordo. Sinjoro *Cherpillod* trovis kaj registris ilin en sia verko »Ne-PIV-aj Vortoj« <NePIV>. Kunlaborantoj de **Pekoteko** difinis kaj tradukis ilin laŭ la regulo de tiu elektronika vortarego. Temas precipe pri propraj nomoj de urboj, personoj kaj varoj. Jen pro spacomanko nur kelkaj malmultaj ekzemploj:

{U1} (666.8-21)
{T1} WHD
{eo1} **Abiĝan**/o** *a*b
{de1} Abidjan *c
{en1} Abidjan *d
{fr1} Abidjan *b
lama regurbo de Eburio k ĝia plej
grava haveno, 1 850 000 loĝantoj. *ĉ laŭ
*c*d

Fon: *a PIV→Eburio; *b LK; *c dtv-lex; *ĉ
pb; *d Webs;

90/ac-0023

Rim: «96-01-04»

{U1} (536-4)
{T1} WHA
{eo1} **Abudabi**/o** *a
{eo2} **Abu-Dabi**/o** *b
{eo3} **Abu Dabi**/o** *c
{de1} Abu Dhabi *d
{en1} Abu Dhabi *ĉ
{fr1}

Plej granda emirlando de la
Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj ĉe la Persa
Golfo. *d laŭ *ĉ

Fon: *a MON; *b MM; *c PIVS →emiro; *ĉ
Webs; *d pb.

90/ac-0040

Rim: pb(92-03-23): Pri divid-streko en
propraj nomoj →ApD6.2#617 «96-01-04»

{U1} 801.313 : 937
{T1} WXH
{eo1} **Aeti**/o** *a
{de1} Aetius *b
{en1}
{fr1} Aetius *ĉ
{la1} Aetius

Romia militestro k politikisto (390
p.K.- 454), protektis la Okcident-Romian
imperion kontraŭ la Ĝermanoj k venke
batis la Hunojn sub Atilo en 451 sur la
Katalaŭnaj Kampoj. *c laŭ *b

Fon: *a PIV→497; *b dtv-lex; *c pb; *ĉ
hw[pb];

90/ac-0062

Terminoteko 14 (2/1996)

Rim: «96-01-04»

{U1} 292.11
{T1} RDH
{eo1} **Alekta**.** *a
{de1} Allekto *f**b
{en1} Alecto *c
{fr1}

Erinio.

Fon: *a PIV→Erini/o; *b dtv-lex[pb]; *c
Webs[pb];

90/ac-0152

Rim: «96-01-05»

{U1} 746.2
{T1} LCK
{eo1} **alenson**/o** *a*b*c*ĉ*e
{de1} Alençonspitze *f**a
{en1}
{fr1} point *m* d'Alençon *d
Punto el la nord-okcident-Franca
urbo Alensono (*Alençon*). *f laŭ *g

Fon: *a EV; *b EKor; *c NEJap; *ĉ zam;
*d NePIV; *e PIV→punto; *f pb; *g dtv-lex;

90/ac-0155

Rim: «96-01-05»

{U1} 801.313 : 398.2
{T1} WXL
{eo1} **Alibab**/o** *c
{eo2} **Ali-Bab**/o** *b
{de1} Ali-Baba *c
{de2} Ali Baba *ĉ
{en1} Ali Baba *a
{fr1}

Araba heroo el "Mil k Unu Noktoj",
la malriĉa arbo-hakisto, kiu malfermas la
pordon de la trezor-kaverno per la magiaj
vortoj "sezamo malfermiĝu". *e laŭ *d

Fon: *a Webs; *b PIV →Ali/o, →trezorejo,
→sezamo; *c LK; *ĉ dtv-lex;

90/ac-0166

Rim: →ApD6.2 «96-01-05»

La plej granda parto de tiuj „ne-PIV-aj
vortoj el PIV“ estas similforme hav-

en kiu formato (vidu paĝon 56 de mia cirkulero EP 95/1.)

Do por Esperantistoj disponantaj pri la nuntempe plej kapablaj softvoj la teknikaj baroj inter la diversaj sistemoj falis. Estas iom ĝene konverti la kodaĵojn por niaj Esperantaj literoj al la malsamaj kodaĵoj, kiujn oni atribuis al niaj literoj en la diversaj sistemoj. Sed tio estas nur dumtempa problemo.

SAT donis al mi la permeson, utiligi difinojn el SAT-eldonaĵoj por la de mi planita MEVo, kaj mi reciproke provizos al la redaktoro de PIV2 la de mi elektronike kolektotajn komentojn, kritikojn kaj aldonojn, por ke PIV2 fariĝu la plej bona ĝis nun ekzistanta presita vortaro, sur kiu baziĝos la plej detala multlingva nur elektronike havebla, sisteme ordigita vortaro. Tiu ĉi kunlaboro garantias, ke ne malsamaj difinoj estos proponitaj en konkurantaj verkoj, kio povus endanĝerigi la unuecon de nia lingvo.

Antaŭe nur per publikigo en vortaro tio povis okazi: Plena Vortaro (1930), Suplemento al Plena Vortaro (1954), Scienca kaj Teknika Terminaro (1956), Plena Ilustrita Vortaro (1970), Suplemento al Plena Ilustritaj Vortaro (1987). Do meznombro du jardekoj pasis, ĝis tute reviziita eldono de ĝenerala vortaro aperis, kaj iom malpli da jaroj ĝis aperis suplementa vortareto en bindita formo. La internaciaj Esperanto-vortaroj servis kiel bazoj por etnolingvaj Esperanto-vortaroj, kaj tiel kontribuis ĝuste pro malofta apero al unueca terminaro de nia lingvo. Tio

estis la pozitiva efiko de la ĝis nun ĉefe uzata publikigo-metodo. Aliflanke la longaj periodoj inter la apero de ĝisdatigitaj vortaroj kaŭzis, ke nia lingvo pli kaj pli postrestis la scio-eksplozon en scienco kaj tekniko. Ni perdis la kontakton kun la modernaj sciencoj.

Sed nun nova metodo de inform-donado kaj vortaro-kreado ekzistas, kiu revolucie ŝanĝas nian terminaran laboron: Elektronika registrado kaj dissendado de termino-kolektoj. Ĝi ebligas al ni registri malmultkoste grandegajn kvantojn da tekstoj, alfabeto aŭtomate ordigi ilin kaj dissendi ilin tutmonde. Tiel raciigo de nia vortrezoro fariĝis realigebla, kondiĉe ke multaj divers-landaj Esperantistoj kunlaboros. Vi faris valoran laboron atentigante neregulaj kaj nelogikaj detaloj en nia lingvo. Espereble via artikolo instigos ne nur min okupiĝi pri tiuj aferoj.

Botanika I ...

Dazun, Edmond. Andrieu, André. Sin nutri en la naturo. Beauville [F-47470]: Amika Esperanto-Rondo Laŭte! 1995, 223 p. Broŝuro DIN A5. 23.- DM.

*Recenzas pastoro Bernhard **Eichkorn**, de pli ol dek jaroj kunordiganto kaj motoro de la Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj (REF), menciitaj plurfoje en la teksto. Krom impreson pri la libro la recenzo peras bonan komprenon pri la mankhava transskribo de botanikaj terminoj en PIV. La „recenza eseo“ pro tio ŝajnas al ni samtempe valora kontribuo pri la*

revizio de PIV. Pri REF vidu ankaŭ Terminoteko-n.ro 11, p. 20.

Bela kolora kovraĵo invitas per floroj kaj fruktoj tralegi la libron. La leganto trovas kelk-cent plantojn (laŭ PIV: arboj, arbustoj, herboj, fungoj) kun manĝeblaj partoj, kiuj kreskas sovaĝaj en la naturo. Nomitaj estas ne nur ilia manĝebleco, sed ofte iliaj utilaj kaj danĝeraj efikoj. Nigre-blankaj dezegnaĵoj helpas pli facile identigi jam konatajn plantojn. Ĉiu planto estas mallonge, ofte iom tro mallonge priskribita. Por difini nekonatan planton oni nepre bezonas pli klarigan plant-libron.

En ĉiu plant-komplekso estas arigitaj en alineo "enteno" la ĉefaj ingrediencoj de la planto, kaj en alineo "terapia uzo" oni legas aron da efikoj aŭ efiko-sferoj en kazo de apliko. Ĉi tie oni nepre bezonas PIV-on. Kiu scias, kio estas *blenoragio* (PIV: inflamo de inaj kaj viraj generaj vojoj), *kokluŝo* (PIV: malsano kun konvulsia tuso), hidropso (PIV: akvoplana ŝvelaĵo en histoj), ktp. Oni rapide laciĝas en tia vortara traserŝado. Mi sopiris en tia libro liston kun mallongaj klarigoj de tiel malmulte konataj vortoj.

Oni miras, kiom da bonaj efikoj havas la plantoj. Kaj la libro ne nur atentigas la nutro-eblecojn, sed multe pritraktas la sanigajn utilojn. Sed mi dubas, ĉu ekz. la arigo de 42 malsanoj en la alineo "terapia uzo" sub la vorto "**AJLO**" (tutmajuskle skribite) rajtigas utiligi la diversajn ajlojn same por ĉiu terapio. Kaj por la terapia uzo mankas

ĉiu atentigo, en kiu kvanto, en kiu formo, en kiu maniero kaj kiel preparite oni utiligu ajlojn aŭ ties ingrediencojn. Kaj ĉefa demando: Kio estas "AJLO"? Ĉu laŭ PIV nur ajlo(3) = la bulbo, aŭ ajlo(2) = la tuta herbo kun la infloresko, aŭ ajlo(1) = legomo kun folioj kaj bulbo. La aldonita bildo montras la infloreskon kaj tigojn de "Ajlo triangula". Post la nomo "AJLO" ja troviĝas la Scienc-Latina nomo *Allium*. Sed nun estas tute neklare, ĉu la efikon de "ajlo" havas nur *Allium sativum* = France: *ail*; Angle: *onion*, *garlic*; Germane: *Knoblauch*; Pole: *czosnek* (difino de la Fundamento por "ajlo" sen la Rusa nomo, kiun mi ne povas legi), aŭ ĉu same efikas ankaŭ *Allium cepa* = cepo kaj similaj specioj de *Allium*, (Rondo de Esperantistaj Flaŭristaj, REF notis 29 speciojn). Sagoj referencas nur al *Allium porrum* = poreo, *Allium schoenoprasum* = ŝenoprazo, kaj *Allium ursinum* = urs-ajlo, kiuj estas aparte notitaj. Laŭ PIV cepo estas specio de ajlo, do "cepa ajlo". Sed "cepa ajlo" ne estas kovrita per la supra Fundamenta difino de ajlo, sed eĉ lezas la Fundamenton.

Ĉi tiu ekzemplo demonstras, ke Esperanto nepre bezonas **klaran sistemon** por la nomado de plant-specioj. La Fundamento de Esperanto difinas per siaj kvin difin-lingvoj nur komun-lingvaj nomojn de plantoj kiel ekz. ajlo, sed ne la Scienc-Latinajn genrojn kiel ekz. *Allium* kaj ne la speciojn (rigardu la suprajn speciojn de *Allium*). La aŭtoroj de ĉi tiu libro atentigas en sia antaŭvorto, ke ili "frontis terminologian problemon". Por plantoj ne troviĝantaj en PIV ili devis

krei Esperanto-nomojn el la internaciaj scienc-Latinaj nomoj. Sed laŭ kiu sistemo?

La **PIV-a sistemo** baziĝanta sur **Wüster** estas **ĥaosa**. Ekz. la Latinajn genro-nomojn finantaj per **-is** estas arbitre transskribitaj ofte el la Latina genitivo **-idis** kiel "-ido", ekz. *Adonis* = adonido, aŭ lasante la **-is**, ekz. *Berberis* = berberiso, aŭ forigante la tutan finaĵon, ekz. *Canabis* = kanabo, aŭ kreante iun simil-sonan vorton, ekz. *Capparis* = kaporo. Tiel jam la transskribo de la genroj estas neklara, kaj ĉe la plant-specioj oni estas tute senhelpa. Pro tio okazis, ke la aŭtoroj donis al la specio *Beta vulgaris* la nomon "Beto sovaĝa", sed al *Hippuris vulgaris* la nomon "Hipurido vulgara". Samajn problemojn spertis en 10-jara laboro la Rondo de Esperantistaj Flaŭristaj. REF ellaboris regulan kaj stabilan sistemon por plant-nomoj, kiun povas apliki ankaŭ homoj ne regantaj la Latinan lingvon. Cetere mi dubas, ĉu oni povas sen lezo de la Fundamento majuskligi la komunlingvaj plant-nomojn (ekz. Beto, Ajlo), kiuj estas minuskle skribitaj en la Fundamento.

Pli ol cent venenaj plantoj estas aparte listigitaj kun informoj, en kio kaj kiel ili estas venenaj. Tiel la libro estas tre utila por homoj, kiuj ŝatas kaj eĉ bezonas nutraĵojn el la libera naturo. La trokultivado de niaj nutraĵoj pli kaj pli bezonas tiajn montrilojn. Por REF mi tuj aĉetis kelkajn ekzemplerojn de ĉi tiu utila libro, ĉar ĝi estas bona kontribuo al la diskutoj pri

Esperanto-nomenklature de sovaĝaj plantoj.

Antaŭ dua eldono mi esperas diskuton inter la aŭtoroj kaj REF-anoj pri unuecigo de la Esperanto-nomenklature. Krome dezirindas listo de vortoj ne troveblaj en PIV, ekz. "dekokte", "fitoterapio" p.1; listo de la malsanoj kun indiko de la paĝoj, kie troviĝas helpantaj plantoj kaj nelaste pli precizan bibliografion (mankas indikoj pri la eldonejoj kaj ties lokoj, eldon-jaroj kaj pri la lingvoj de la libroj).

Sed tiaj etaj mankoj ne malgrandigu la veran meriton verki kaj eldoni tian libron en Esperanto, kie ĝenerale malmultas faka literaturo.

La 43-paĝan kajeron "REF-regularo" (10 DM + senkostoj) kaj "Liston de speciaj epitetoj" oni povas mendi ĉe la recenzinto B. Eichkorn, Romäusring 20, D 78050 Villingen, Germanujo. Kp. ankaŭ p.64.

Botanika II ...

Szczepanski, Wladyslaw. Sovaĝaj Plantoj en Eŭropo - Pola Listo. Sen loko [Labiszyn]: La aŭtoro, sen jaro [1995 ?], 27 tajpitaj kaj kopiitaj paĝoj [prezo nekonata].

Temas pri trikolumna listo Pola-Esperanta-Scienc-Latina de plantoj troveblaj en Pollando, ordigita laŭ Pola alfabeto. Pola traduko de parto de la REF-regularo - se mi ĝuste divenas - kompletigas la verketon. Jen specimenoj de la (tre malfajne

taksite) ĉ. 3500 plantnomoj (akcentita »n« anstataŭigita per simpla »n«):

Arnika górska	Arniko Monta	Arnica montana L.
Aster alpejski	Astero Alpa	Aster alpinus L.
amery- kanski	Novangla	Novae- Angliae
drobno- kwiatowy	etflora	Trades- canti L.
ktp.	ktp.	ktp.

Pro densa skribo kaj forte malgrand-iga kopiado la listo foje estas iom malfacile legebla precipe tie, kie la linioj intermiksiĝas. Kiu serĉas plantnomon en Esperanto aŭ la scienca lingvaĵo surbaze de la Pola lingvo skribu rekte al sinjoro Wladyslaw **Szczepanski**, Skr. P. 14, PL-89-210 Labiszyn, Pollando (de kiu ni petas indulgon pro nia limigita komputora literaro, kiu ne inkluzivas la diakritajn Polajn literojn).

Botanika III ...

František Mlynár. Morfologio de Plantoj: Floroj, 1986, 281 p. Fruktoj, 1982, 100 p. Semero, 1982, 45 p. Lanškroun [CS]: Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA. Tajpita kaj kopiita foliaro kun multaj desegnaĵoj en dosierujo.

De sinjoro Johano **Pachter**, Berlino, ni danke ricevis kopion de la triparta botanika ĉefverko de la intertempe mortita sinjoro Mlynár en Esperanto.

Por faciligi la uzon ni trafoliumis la tri partojn de la verko „per la komputoro“. En iuspeca „labor-indekso“ ni notis ĉapitrojn (per komencaj majus-

kloj) kaj gravajn terminojn (per minuskloj). Pro tio ekz. **Florbazo** indikas la komencon de ĉapitro kun tiu titolo, dum **florbazo** sendas al la nociokomplekso. Paĝo-indikojn sen akompana litero referencas al la parto „Floroj“, tiuj kun »F« al „Fruktoj“ kaj tiuj kun »S« al „Semero“. Krom ĉe »floro« ni notis nur la bazajn terminojn, ne la multajn kunmetaĵojn kiel ekz. **sepalo ovoforma, langoforma, korforma, linioforma, oblonga, inverse ovoforma**, ktp. Ilin oni facile trovas foliumante kelkajn paĝojn post la indikita **sepalo**. La „labor-indekso“ do ne celas perfekte respeguli la terminan riĉon de la verko, sed nur faciligi la orientiĝon en ĝi. Krome ĝi espereble donas ideon al niaj legantoj pri ties enhavo.

Indekso

- A -

abrikoto	F 35
adelfogamio	218
akeno	F 52
akvogamio	226
albumeno	S 18
alo	140
alogamio	217
anakardio okcidenta: frukto de	F 47
ananaso	F 46
Andreceoj	87
androforo	17, 263
anemogamio	227
antaŭembrio	S 5
anteridioj	279
antero	67, 73
Antero: Anatomio de la	72
Anteroj : dehiskado de la	67
Anteroj laŭ la kunligo kun sia fadeno ..	74
antipodoj	188
aperturo	213
apokarpio	F 16
arĥegonioj	279
arilo	S 36
aŭtogamio	214

- B -

basketo	52
basko	251
beka	F 7
bekhava	F 7
bero	F 21
burzikulo	202

- C -

cenokarpio	F 16
cikatrikulo	S 26

- Ĉ -

ĉambro	F 13
ĉerizo	F 35
ĉirkaŭfloro	244

- D -

daktilarbo	F 25
------------------	------

dehiskado de fruktoj	F 14
denta	117
denta	52
diĥogamio	221
disko nektara	20
drupo	F 33
duakeno	F 83
durio	F 30

- E -

ekzino	212
ekzokarpo	F 9
ekzokarpo: frukto de	F 50
ekzostomo	174
ekzoteko	72
Elkreskaĵoj	235
embrio	278
embrio	S 7
endokarpo	F 10
endopleŭro	S 31
endospermo	S 20
endostomo	174
endoteko	72
entomogamio	228
epiblasto	S 8
epikarpo	F 9
epikotiledono	S 17
epispermio	S 31
ergoto	112

- F -

falgo	141
fenda	51, 118, 252
figo	F 44
filamento	56
Filamentoj laŭ la formo	62
Florbazo	265
florbazo	8
flormielo	237
floro	4
floro alotropa	231
Floro de la poacoj kaj ciperacoj	273
floro eŭtropia	232
floro flanka	7
floro pedunkla	5
floro pinta	6
floro sesila	5
Floroj laŭ la seksaj organoj	265

Florj laŭ la simetrio.....	131
Florj laŭ nombro de stamenoj	84
Florvestaĵo	240
florvestaĵo.....	33
foliklo.....	F 62
forniko	238
frago.....	F 40
Fruktoj.....	F 4
Fruktoj disiĝaj.....	F 79
Fruktoj karnecaj	F 20
Fruktoj sekaj dehiskaj	F 60
Fruktoj sekaj nedehtiskaj	F 51
Fruktoj sekaj plursemeraj.....	F 59
Fruktoj semaj	F 86
Fruktoj veraj aŭ nudaj	F 19
funiklo	180
funiklo	S 24

- G -

gameto.....	278
geitonogamio	217
ginandroforo.....	19
gineceo	166
Ginkgo.....	190
ginoforo	18, 264
ginostemo	55, 200
glumo	275
gneziogamio.....	220
gorĝo.....	53, 117, 143, 152, 250
granato.....	F 28
guŝo	F 63

- Ĝ -

ĝermado.....	S 40
ĝermlobo.....	S 15
ĝermo.....	S 7
ĝermradiko	S 13
ĝermtigo.....	S 11
ĝermtufo.....	S 14

- H -

haro.....	246
herkogamio	226
hibridogamio	220
hidrogamio	226
hilumo	182
hilumo	S 24
hipantio	259

hipokotiledono	S 16
homodiĥogamio.....	225
homogamio	224

- Ď -

ĥalazo.....	189
ĥazmogamio.....	216
ĥiropterogamio	230

- I -

inaĵaro	166
integumentoj.....	279
intino.....	212

- J -

juglando.....	F 37
---------------	------

- K -

Kaliko	103
Kalikoj kunkreskintaj.....	116
Kalikoj laŭ la daŭro.....	127
Kalikoj laŭ la koloroj	130
Kalikoj laŭ la lokiĝo.....	129
Kalikoj liberaj laŭ la nombro de la sepaloj	110
Kalikoj specialaj.....	112
kapsulo	F 66
kariopso.....	F 56
karpelo	158
karunklo.....	S 35
kilo	140
kleistogamio	216
koleoptilo	S 11
koleorizo	S 8
konektivo	57
konusbero	F 91
konusfrukto.....	F 47
konuso.....	F 87
korolo	89
Koroloj kunkreskintaj	142
Koroloj laŭ la daŭro	154
Koroloj liberfoliaj.....	137
kotiledono	S 15
kovraĵfolio	244
kremokarpio	F 82
kristo.....	S 36
kromkorolo	238

ksantio: frukto deF 48
ksenogamio 218
kserokarpo F 10
kukumfrukto F 27
kupulo 11, 259
kupulo F 5
kvarakeno F 81

- L -

legumeno F 63
lemno 275
limbo 53, 90, 116, 142, 250
lipo 150
Listo de la bildoj F 96
Literaturo F 95, S 43
lizikarpo F 17
loba 51, 117, 251
lodikulo 276
loĝio 160
lomento F 80

- M -

malakogamio 229
masko 152
metaginio 226
metandrio 225
mezokarpo F 9
mikropilo 181
monokarpo F 16
moruso F 45

- N -

nektarglando 235
nektario 24, 235
nektaro 32, 237
notogamio 220
nucelo 184
nucelo 279
nukso F 58
nukulo F 81

- O -

ofalopodio S 26
oosfero 186
operkulo 213
oranĝfrukto F 26
ornitogamia planto 230

Ovario 157
Ovulo 169
ovolujo 157

- P -

paleo 276
papriko F 31
parakarpio F 17
parta 51, 118, 252
pepo F 27
Perianto 240
perianto 33
periginio 277
Perigono 244
perigono 39
perigono atrofita 37
perikarpo F 8
perispermo S 19
petalo 90
Petaloj kaj iliaj formoj 89
pipro F 29
pireno F 12
Pistilo 155
pistilportilo 264
pistilstamenaĵo 55, 200
pistolportilo 18
Placentacio 191
placento 191
planto dioika 271
planto monoika 271
Plantoj laŭ la seksaj organoj 271
plumulo S 14
pokaleto 11, 259
Polenado 214
polenaĵo 55
Poleno 209
pomo F 41
protalioj 279
protandrio 221
protoginio 222
pruno F 35
pseŭdoperigonio 40
pulpo F 12
putameno F 12

- R -

radikulo S 13
rafeo 183

rafeo S 27
 receptaklo 13, 260
 regmo F 84
 remparo glanda 237
 rostelo 202
 rozofrukto F 43

- S -

sako embria 185
 samaro F 55
 sarkokarpo F 11
 sembero F 92
 semdrupo F 93
 Semo S 2
 sepalo 106
 septo 162
 silikveto F 65
 silikvo F 64
 sinergido 187
 sinkarpio F 17
 sklerokarpo F 11
 skutelo S 9
 skvamo 237
 spermoforo F 14
 spermotilio S 28
 spiketo 273
 sporo 278
 sporogenezo 278
 stamen-pistilportilo 19
 stamenfadeno 56
 stameno 54, 76
 stamenoj kunanteraj 60
 Stamenoj laŭ la inserta loko 77
 Stamenoj laŭ la kunkresko de la fadenoj 82
 Stamenoj laŭ la longo 76
 Stamenoj rilate al ovario 80
 stamenportilo 17
 staminoïdo 56
 Stigmo 205
 stilopodio 200
 Stilusmalsameco 203
 Stiluso 194
 strobilo F 87
 sulko 71
 Superrigardo pri fruktoj F 6
 sutoro 71
 suturo 163

suturo F 13
 Ŝajnfruktoj F 39

- T -

tapeto 72
 tegmeno S 31
 tegumento 173
 tepalo 49, 244
 tepalo skvameca 246
 testo S 29
 tetradogenezo 278
 tigumo S 12
 Toro 256, 263
 toruso 256
 tubo 53, 116, 142, 250
 tufo 109
 tufo S 22

- U -

ungolo 92
 utrikulo F 78

- V -

valvo 71
 vivigeo 232

- Z -

zigoto 278
 zoidiogamio 228

pb 1996-02-10

ĉeĥa ...

La Ĉeĥan-Esperantan-Ĉeĥan poŝvortaron, pri kiu kunlaboris mgr. Zdeněk Hršel, Botanická 28, Brno, CZ-60200, Ĉeĥujo, ni menciis en Terminoteko 10, p. 15. En 1995 fine aperis ĉe KAVA-PECH Vortaro Esperanta-ĉeĥa de Karel **Kraft** kaj Miroslav **Malovec**. Ĝi enhavas XXI + 239 paĝojn kun ĉ. 26 000 enskriboj laŭ jena tipo:

atom/o atom

atom/armil/o atomová zbraň

atom/bomb/o atomová bomba

atom/energi/o atomová energie

atom/kern/o atomové jádro

atom/pil/o, atom/reaktor/o atomový reaktor

Kiel nia ekzemplo montras, ĝi estas interesa ankaŭ por Esperantistoj, kiuj ne regas la Ĉeĥan. Subtenu do la diligentan laboron per aĉeto!

Daŭrigante sian vortaran laboron sinjoro Hršel nun okupiĝas pri mezampleksa Ĉeĥa-Esperanta vortaro, »kiu tamen apenaŭ estos preta ĝis UK en Prago« en 1996. La vortaro estos baze simile aranĝita kiel la poŝvortaro.

Ni elkore gratulas al sinjoro Hršel kaj liaj kunaŭtoroj pro la sistema kaj celorientita laboro. La "mezampleksa" vortaro estos – se ni ne eraras - la unua tiutipa de post la vortaro de Hromada el la jaro 1961:

1961 Hromada, Rudolf. Ea-Ĉeĥa-Ea poŝvortaro. Prago. Repr. Prago, Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1989, 349 p. 10,5 x 8 cm. Kun aneksa Esperanto-gramatiketo por Ĉeĥoj de Thomáš Pumpr.

La plej malnova Ĉeĥa vortaro en nia biblioteko estas:

E. Kühnl, K. Procházka. Slovník Česko – Esperantský [25 000 vortoj]. Biblioteko de „Časopis Českých Esperantistů“, Praha [Prago] 1914, 284 p.

Etimologia I ...

Yamasaki, Seikô. Etimologia Vortareto Pragmata de Esperanto. Tokio [J]: Libroteko 1991.

kemia ...

Jan Waclaw Pióro. Kemia Internacia Vortaro kun Enciklopedio de Kemia Nomenklatur, 2a eld. Piastów: La aŭtoro 1996 [1995].

Naturkuracista ...

Scolnik. Buchholz: MZ-Verlag Harald Schicke. ISBN 3-89240-087-3.

Seiĉi Kato. Lernolibro de oftalmologio. Represo de la eldono 19... Buchholz: .. La libro klarigas la kuracadon de multaj malsanoj per naturaj rimedoj.

lern-programa...

Krom pri geofizika terminaro (vd. supre) inĝenierino Olga Lidia Meneses Duarte, Santa Cruz del Norte, Apdo 6, C.P. 32900, La Habanna, Kubo, aktivas pri »metodologio kaj rimedoj por malfermi „Esperantan Amuzkomputilan Metiejon« . Temas pri elementa kaj supera Hispan-lingva komputora kurso, per kiu infanoj ludante lernu Esperanton. Jen la sep komputoraj ludoj de la unua fazo „alkutimiĝado“: »primeras teclas« (unuaj klavoj), »ABC« (puzlo), »escoge« (elektu), ilustru, memoru, plenigu, »la espiral del conocimiento« (la Spiralo de l’Kono). Pliajn informojn pri tiu imitinda laboro haveblas kontraŭ alsendo de du malplenaj 3,5-colaj diskedoj kaj du irk-oj de sinjorino Meneses Duarte.

Ŝaka ...

Ŝakan vortoliston en Itala, Eo, Angla kaj Franca verkis d-ro Picasso. [laŭ informo de prof. *Minnaja* de 1995-12-03]

Reto komputora

Ni ricevis la t.n. „Flavajn paĝojn de Esperanto“ el la internacia komputora reto. Ĝi enhavas ret-adresojn de multaj Esperantistoj mondvaste kaj pliajn interesajn informojn. Por doni impreson al vi ni tie ĉi senŝanĝe represas la „titolpaĝon“ en la kruda formo necesa por teknikaj kialoj de transsendado tra telefonaj lineoj. La listo estas daŭre aktualigita, probable jam ekzistas aktualigita versio, kiam vi legos tiun ĉi kajeron.

```

#-----#
#                                     #
# ADRESARO DE RETE ATINGEBLAJ ESPERANTISTOJ KAJ EO-ORGANIZOJ #
#                                     #
# - iniciatita de Philippe BERIZZI (organizo)           #
#   kaj Martin WEICHERT (individuoj)                   #
# - administrata de Derk EDERVEEN <derk@saluton.iaf.nl> #
#   Fidonet 2:283/323.7                                 #
#                                     #
#   SENDU KOREKTOJN KAJ ALDONOJN!                       #
#                                     #
# dato de lasta sxangxo: 31-05-95   forigu malnovan version! #
# 761 adresoj de 532 personoj el 46 landoj                 #
# 178 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj, kaj 37 internaciaj #
# por privataj, ne komercaj celoj                         #
# por faciligi rektan kontakton, ne por grandskala dissendado #
# libere pludonebla al cxiu interesita samlingvano       #
#                                     #
#-----#

```

Jen citaĵo el la „adresaro“ por Irano, Islando kaj Israelo por doni al vi ideon pri la enhavo:

- Irano (.ir)
 - + Saeed VAHID <vahid@irearn.bitnet>
 - Esperantistoj en Tehran:
 - peranto: Saeed VAHID

- Islando (.is)
 - + VIDAR Gudmundsson <vidar@raunvis.hi.is>
 - IEA (Islanda Esperanto-Asocio):
 - individua membro: VIDAR Gudmundsson
 - La Tradukisto (revuo):
 - eldonanto: Kristjan EIRIKSSON (.no)

- Israelo (.il)
 - + Eli BAR-YAHALOM <matby11@technion.technion.ac.il>
 - + Eli BAR-YAHALOM <matby11@technion.bitnet>
 - + Alexander MIKISHEV <filuet@elronet.co.il>
 - + Alexander MIKISHEV <mikisal@math.tau.ac.il>
 - + Eldad SALZMANN <cerssez@technion.technion.ac.il>
 - + Eldad SALZMANN <cerssez@ibm.technion.ac.il>
 - + Eldad SALZMANN <cerssez@technion.bitnet>
 - + Eldad SALZMANN <eldad@coma.huji.ac.il>
 - + Amri WANDEL <fnwandel@weizmann.weizmann.ac.il>
 - + Amri WANDEL <fnwandel@weizmann.bitnet>
 - + Amri WANDEL <amri@hujivms.huji.ac.il>
 - ELI:
 - prezidanto: Amri WANDEL
 - membro: Alexander MIKISHEV
 - Junularo:
 - prezidanto: Eldad SALZMANN

Krom kontaktoj, kio ekzistas krome en la „Reto“? Jen ekzemploj:

- Rete legeblaj Esperanto-tekstoj kaj librokatalogoj:
=====
- o En la nederlanda FTP-ejo estas pluraj tekstoj, interalie:
 - o La Sankta Biblio
 - o Listo pri Esperanto en la radio:
 - FTP: ftp.stack.unc.tue.nl:
 - /pub/esperanto/introductions.dir/radio-programoj.txt
 - aux /pub/esperanto/incoming/introductions.dir/radio-programoj.txt
 - Gerard van der HORST <espero@saluton.iaf.nl>
 - o La Librokatalogo de UEA. Adreso por mendoj:
 - UEA <uea@inter.nl.net>

- o La Librokatalogo de la ELNA-libroservo: vd. FTP-ejo de ELNA.
- o Hiperteksta listo de literaturajxoj en la reto:
FTP: ftp.netcom.com: /pub/do/donh/literaturo.html
!: Don HARLOW <donh@netcom.com>
- o Liston de cxuij novaj Esperanto-libroj (mendeblaj cxe FEL) kaj
o cxuijn tekstojn de MONATO havas enkomputile FEL, Flandra
Esperanto-Ligo. !:
Paul PEERAERTS <100272.1601@compuserve.com>
- o ELENA (ELEktronika Esperanto-Novajx-Agentejo) cxe la
WWW-ejo de DEMOS en Moskvo: vd. WWW.
- o La gazeto "Eventoj" en la reto, cxe WWW-ejo de DEMOS en Moskvo: vd. WWW.
Andrej ANANJIN <aaa@junior.msk.su>
- o Kontribuoj al "Eventoj": <eventoj@odin.net>
- o % Listo pri sciencfikciaj libroj kiuj mencias Esperanton:
gopher://roundtable.cif.rochester.edu:70/00/Esperanto/misc/sci-fi
- o % Internacia, perreta gazeto "International Teletimes", ankaux en Esperanto:
http://www.teletimes.wis.net/teletimes_home_page_esper.html
Marvin ENTZ <Marvin_Entz@mindlink.bc.ca>

Kelkaj bibliotekaj katalogoj kiuj enhavas esperantajxojn:

-
- o U. of California (450 titoloj): telnet melvyl.ucop.edu (195.35.22.222)
 - o U. Saarbrücken (>300 titoloj): telnet 134.96.100.100, uzu ".a logon ub,ub"
 - o Katholieke U. Nijmegen (234 tit): telnet kunlb1.ubn.kun.nl (131.174.81.246)
 - o Pluraj bibliotekoj en/apud Otavo, Kanado. !:
Manuel CAMPAGNA <ah514@freenet.carleton.ca>

Bildoj kaj sonoj:

=====

- o bildoj pri kelkaj esperantistaj retanoj:
http://www.cs.chalmers.se/~martinw/fla-pa/galerio.html
- o bildo pri Zamenhof:
ftp://ftp.stack.unc.edu/pub/esperanto/esperanto-texts.dir/zamenhof.gif
- o la vocxo de Zamenhof (4 minutoj):
ftp://ftp.stack.unc.edu/pub/esperanto/esperanto-texts.dir/zamenhof.au.Z
- o specimenoj de la Esperantlingvaj sonoj:
ftp://ftp.netcom.com/pub/do/donh/ecourse/esounds/esounds.html
- o Esperanto-Muziko:
http://lightning.eee.strath.ac.uk/~duncan/esperanto/muziko/muziko.html
Duncan C. THOMSON <duncan@spd.eee.strath.ac.uk>

Ĉu vi komprenis? Ne lasu vin timigi komputoro „trafoliumi“ la „libro-
de la strangaj simboloj. Jen denove katalogojn“ de kelkaj universitatoj, kiuj
kelkaj interesaj informoj en klara ankaŭ havas Esperanto-librojn, ekz. la
teksto. Vi povas hejme ĉe la Universitatoj de Kalifornio (Usono) aŭ

Saarbrücken (Germanujo). De la komputoro de la »tue.nl«, t.e. de la Teknika Universitato de Enschede (?) en Nederlando, vi povas kopii elektronikajn dosierojn kun bildo de Zamenhof kaj eĉ dosieron kun kvar minutoj de la Zamenhofa voĉo. Kopiinte ĝin sur via hejma komputoro kompreneble necesas, ke via privata komputoro disponas pri teknika instalaĵo („hardvo“), kiu ebligas konverti elektronikan dosieron al sonoj, t.n. „son-karto“. Se vi posedas tion, via komputoro do povas paroli al vi per la voĉo de Zamenhof! Nekredeble, ĉu? Tamen eblas (ni ja vivas en la jaro mil naŭcent naŭdek ses!). Same vi povas kopii kaj poste aŭdigi specimenojn de Esperanta muziko (storigita sur iu komputoro en Britujo [.uk]). Ktp. Kompreneble ekzistas Esperanto-kursoj en la Reto. Ni eĉ jam ekkonis nov-bakitan Esperantiston, kiu lernis la lingvon per komputora kurso. Kaj ankaŭ por terminaristoj ekzistas interesaj tekstoj en la Reto: terminaroj, tezaŭro (vd. supre), la Biblio k.a. Do, espereble ni povis peri al vi impreson pri interesa teknika helpilo, kiu certe fariĝos ankoraŭ pli gravaj dum la venontaj jaroj. Nun ni tamen forlasu tiun mondon kaj revenu al nia Esperanta terminologio:

Esperantologio kaj terminologio

Informilo por Interlingvistoj (Ipl)

aperas en la kvara jaro de la tria serio, eldonata de la Centro de

Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED de UEA) sub la redakto de nia leganto d-ro Blanke, Berlino. Eble pro tio ĝi kaj forme kaj enhave similas al la German-lingva *Interlinguistische Informationen* de la sama redaktoro (vd. Terminoteko-n 12, p. 53), aspektas kvazaŭ ties Esperant-lingva frato. Jen kelkaj el ĝiaj multaj informoj, interesaj ankaŭ por terminaristoj, ĉerpitaj el kajero 14-15 (3-4/1995):

- PIV reviziata (bibliografieto de kvar artikoloj pri la temo)
- Aperis la akto de la kolokvo de la Akademio en Prago 1994 (i.a. kun kontribuoj pri „la defio faklingvo“, „fakaj terminoj de ĉiutaga lingvo“ ktp.)
- Aktuala bibliografio kun sekcio »faklingvo/terminologio« mencianta i.a. nian Germanan Indekson de Slipara Vortaro (Terminoteko 9)

La leginda Informilo estas mendebla ĉe CED de UEA, Nw. Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

niaj vortaristoj

YAMASAKI Seikō

Naskiĝis en XXXX

1952 Licenciito pri ekonomiko

1956-86 Laboris en internacia komerco, ktp. vd. dosiero ys.

Verkoj

De ys

1993 1399

Esperanto estas eŭropa lingvo

Eŭropeco

REo 1993/7p.130

1993 1400
Problemoj de prononco
fonetiko
LetAka 1993/22, p.3

1993
Monda Forumo 1993/6, p.25ss

1992
Terminologiaj Observoj
Japana Esperantologio 1992/1, p. xxx

Pri ys

Gotô, Hitosi 1992
[Pri Yamasaki, Seikô. Etimologia
Vortareto Pragmata. Tokio 1991]
recenzo;etimologio
La movado 1992/7
»komplete senutila« 2177

Hall, Adrian 1993
[Pri Yamasaki, Seikô. Etimologia
Vortareto Pragmata. Tokio 1991]
recenzo;etimologio
REo 1993/6
»Eo-angla vortaro etimologieta«

Kamaço, Georgo 1992
[Pri Yamasaki, Seikô. Etimologia
Vortareto Pragmata. Tokio 1991]
recenzo;etimologio
Fonto 1992/4

„La faklingvo en Esperanto“

Doktoro Werner Bormann, Schärstr.
26, D-21031 Hamburg, Germanujo
atentigis nin pri sia prelego »La
faklingvo en Esperanto« dum la 78-a

Terminoteko 14 (2/1996)

Brita Kongreso de Esperanto en
Richmond je 1994-04-02. Kopio de la
prelego-teksto (3 p. A4) estas havebla
de la aŭtoro aŭ redaktanto.

Esperanta historiografio...

lom ekster la kutima temo de nia
informilo ni en tiu ĉi numero koncize
traktas la temon »Esperanta historio-
grafio«. Ekzistas tri precipaj kialoj.
Unue kaj plej grave, la temo interesas
nin persone. Due estas konstateblaj
iuj laŭ ni tre bonvenaj aktivecoj
lasttempaj sur tiu grava kampo, nome
la »Jarfina kaj Zamenhofa Festo«
(JAZAF '95) kaj la apero de bona
historio de la Esperanto-grupo
Ŝverino en Meklemburgujo (norda
Germanujo). Laste ni per nia modesta
rubriko »niaj vortaristoj« ja jam
tradicie klopodis - eĉ se plej limigite -
iom kontribueti al iama reviziita eldono
de la „Enciklopedio de Esperanto“ (vd.
niajn enkondukajn vortojn en
Terminoteko 10, p. 24).

Ni tre ĝojas, ke doktoro *Ulrich Lins*,
sendube unu el la plej gravaj historio-
grafoj de nia komunumo kaj i.a. kun-
redaktoro de „Esperanto en
Perspektivo“ (1974), aŭtoro de la
konata „Danĝera Lingvo“ (1988,
Germana kaj Itala tradukoj) kaj de
multaj aliaj studoj pri la historio de
Esperanto sendis al ni la sekvantan
raporton pri JAZAF '95.

[la tajpita teksto en 1996 ne jam estis
klavata per la komputoro kaj tial
mankas tie ĉi]

Sinjorino Ino **Kolbe** el *Leipzig*, Germanujo, la filino de la fondinto de la Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) *Reinhold Voigt*, verkis Germanlingvan historion pri tiu organizaĵo. La unua parto (ĝis 1924) aperis jam en 1991, la dua parto (ĝis 1933) nur nun fariĝis pres-preta kaj estu kunigita kun la unua en la verko: *Ino Kolbe. Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto Bundes in Leipzig (West Sachsen). Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot (1933). Eine kommentierte Dokumentation. Herausgegeben, dokumentiert und bearbeitet von Detlev Blanke. Landesverband Sachsen im Deutschen Esperanto-Bund e.V., Leipzig 1996, 240 S.* Ne pro la iom baroka titolo, sed pro ĝeneralaj preskostoj en Germanujo necesas ankoraŭ donacoj por financi la eldonon. Kiu ŝatas subteni la aperon de tiu ĝis nun plej ampleksa libro pri GLEA petu detalan informilon de Dr. sc. D. **Blanke**, Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, tel./faks. ..49-30-541.26.33.

lingvaj diskutoj

Blankaj Abioj en Nigra Arbaro kaj fagoj ĉe la arbar-rando

Al la artikoleto en Terminoteko 12, p. 60 kaj 62, sinjoro Ingwart **Ullrich**

(adr. vd. supre) reagis per jenaj rimarkigoj:

Mi subtenas la majuskligon de komunlingvaj plantonomoj, speciale de arboj, se oni

1. nomas kune genron (*genus*) kaj specion (*species*): Abio Blanka, Fago Arbara, Lariko Siberia, Acero Plataneca;
2. celas genron entute (Piceo/Picea spp./Kverko, ktp.), sed ne, se oni celas la unuopajn individuojn.

Ekz.:

- »Nigra Arbaro estas la ĉefa trovejo de **Abio Blanka** en Germanio.«
- Rilate al novspecaj arbardifektoj **Fago** montras la plej fortajn damaĝojn.«

Sed:

- »La **fagoj** ĉe la arbarrando montras la plej fortajn damaĝojn.«

Plue:

- »**Abio Blanka** povas esti **granda abio** (ne: granda **Abio**), sed **Abio Granda** neniam povas esti **Abio Blanka**. Kaj malgranda **Abio Granda** komenckreskanta tute ne povas esti nomata **granda abio** (ne: granda **Abio**)«.
- Turingia Montaro estas kovrita ĉefe per **Piceo**, sed la plej multaj **piceoj** estas damiĝitaj fare de enaerigitaj nocaĵ substancoj (emisiaĵoj).«

Ĉapelilo

Ortografi-kontrola funkcio por Esperanto estas bela, sed precipe en Esperanto pro ties facilaj reguloj mi

apenaŭ bezonas ĝin. Por la kelkaj dubaj kazoj (procedo, procezo, proceso, k.a.) ĝi ne helpas, ĉar simple donas tian liston kaj lasas al la uzanto mem decidi. Necesas do tamen kontroli en (libroforma) vortaro. Kaj pri simplaj klav-eraroj? Mi faris jenan proveton: Mi ŝarĝis la kunsenditan tekston »legu_min.ilo« kaj intence ŝanĝis la vorton »firmao« al la malĝusta »hirmao«, supozante ke mi tiel misklavus ĝin. Poste mi funkciigis la ortografi-funkcion. La programo tuj trovis la malĝustan formon. Petante korekt-proponojn mi ricevis longan liston de 22 vortoj, ĉiuj komencantaj per »h«, tamen ne la ĝustan »firmao«. Do nur helpis trovi iun malĝuste skribitan vorton, la korekt-laboro mi mem devis fari. Plia samspeca provo per »firnao« (ofta intermikso de »n« kaj »m«, troviĝantaj apude sur ĉiuj al mi konataj klavaroj). Rezulto: tuja trovado, proponado de 25 vortoj, tamen ne de la ĝusta (sed ja de »firmaano«). Lasta provo: »like« anstataŭ »lige«. Tuja trovado, proponado de 50 (!) formoj, i.a. »liga«, tamen ne de la bezonata ĝusta. Praktike tio do signifas, ke la funkcio ja helpas trovi „ion malĝustan“, sed apenaŭ helpas trovi la ĝustan formon.

kodaĵoj, legeblaj per IBM-kongruaj komputoroj. Interesatoj kontaktu Bertilo Wennergren, Sannadalsv. 4, 2 tr., S-117 65 Stockholm, Svedujo.

Terminoteko

Informilo pri terminara laboro de Germana Esperanto-Instituto
Terminologische Informationen des Deutschen Esperanto-Instituts
 aperas du-foje jare/*halbjährlich*
 ISSN 1430-4473

Redaktas kaj respondecas/verantwortlich:
 Bernhard Pabst, Südweg 42, D-53773 Hennef,
 Germanujo. ☎..49-22.42-86.65.80

Eld./Hrsg.: Germana Esperanto-Instituto (GEI)
 Multobligas kaj dissendas/*Herstellung u. Versand:*

Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Antverpeno
 Eldonkvanto/*Aufl.:* 120 ekzempleroj.

Prezo: Terminoteko estas senkosta por terminaraj aktivuloj, kiuj de tempo al tempo alsendas informojn pri siaj terminaraj aktivecoj, recenz-ekzemplerojn, diskedojn ktp. Por kompletigi la Elektronikan Bibliografion de Esperantaj Artikoloj EBEA la redaktanto daŭre serĉas malnovajn Esperanto-gazetojn. Donacojn por subteni la sendkostojn oni povas ĝiri al Deutscher Esperanto-Bund, Stadtparkasse Korschenbroich, BLZ 310 512 40, konto 67 66 68 kun la mencio »por Terminoteko«. Donacoj estas subtraheblaj de la Germana impostodevo. Monbiletojn aŭ Germanajn poŝtmarkojn oni povas sendi al la redaktanto.

Represo kaj diskonigo de la informoj estas permesata, se la fonto „Terminoteko“ estas klare indikita. © Bernhard Pabst, Hennef 1996

Terminaro de ... muzikaj terminoj

Terminaro de ... muzikaj terminoj, skribitaj per Atari-komputoro kaj tekst-programo Signum.

Sinjoro Wennergren tamen ankaŭ sukcesis konverti ĝin al ASCII-

la historia citaĵo

»Al tiuj, kuj faras el la ortografio de propraj nomoj fetiĉon, sendube ne plaĉos ties esperantigo laŭ proksimuma prononciĝo. Ĉiuj eventualaj kritikoj tiurilate lasos min absolute indifera: mi estas sennaciisto k havas nenian respekton por naciaĵoj. Ĉi-okaze mi rimarkigas, ke la ĉinaj, japanaj k slavaj esperantistoj rajtus senĉese kriplori ĉe la konstato, ke iliaj nomoj estas en esperanto k en eŭropaj lingvoj abomeninde kripligitaj. Ĉu do la eŭropanoj rajtas postuli, ke oni traktu ilin aliel ol homoj el aliaj mondpartoj? Certe ne! Al tia imperismo mi kontraŭstaras. ...
Kiu konsideras la proprajn nomojn tabuoj, tiuj estas nur duon-esperantistoj k senkonsciaj malamikoj de la mondlingva afero.

E. Lanti en antaŭparolo al sia traduko de Paŭlo Ĝil (Paul Gille), Skizo pri filozofio de la homa digno, Parizo: SAT 1934, p. 8-9.

anonco

Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj REF

kolektis dum 10-jara laboro komunlingvaj nomojn de sovaĝaj plantoj en Eŭropo en giganta Plant-Nomaro:

- (1) **750 paĝa (!!)** teko kun ĉiuj **REF-dokumentoj** kun la ĉeflisto ordigita laŭ **Esperant-sciencia**: 50,- DM
- (2) **REF-regularo** 43 paĝa, la detala transskribo-sistemo: 10,- DM
- (3) **Angla** - Eo - Scienc-Latina, 3258 plant-nomoj, 130 p.: 10,- DM
- (4) **Franca** - Eo - Scienc-Latina, 2977 plant-nomoj, 79 p.: 10,- DM
- (5) **Germana** - Eo - Scienc-Latina, 7783 plant-nomoj, 209 p.: 20,- DM
- (6) **Nederlanda** - Eo - Scienc-Latina, 3552 plant-nomoj, 105 p.: 10,- DM

Aldoniĝas sendokostoj. Mendu ĉe

Bernhard **Eichkorn**, Romäusring 20,
D-78050 Villingen, Germanujo

Averto okaze de la represo 2006

Enhava senŝanĝa represo de la *torso* de Septembro 1996. Terminoteko 14 ne plu estis fin-redaktita kaj ne plu estis dissendita surpapere. Nekompletaj ekz-e estas „niaj vortaristoj“, la listo de la PIV-aj fakoj reviziindaj uzas skribon „EspeTimes“, pri kiu ni ne plu disponas, tiel ke tie ĉi aperas sensencaj simboloj, la enhavo ne plenigas 32 paĝojn en formato A5 (8 folioj A4 falditaj), la enhavo-tabelo estas fuŝita ktp.

Per n-ro 13 la bulteno Terminoteko malaperis post iom pli ol kvin jaroj. Ĉar tamen la torso enhavas kelkajn interesajn artikolojn, ni nun prezentas ĝin tie ĉi kiel elektronika represo. Multaj kontakt-adresoj ne plu validas.

Kontaktu nun

Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigo [ĉe] per @)

© Bernhard Pabst, 09.2006